# FRANCA KATOLIKA ESPERANTISTO


**Nº 199 DECEMBRO 1998**

La numero : 10 FF Abono: 40 FF Kotizo: 20FF Sume: 60 FF

TRIMONATA BULTENO de FRANCA KATOLIKA ESPERANTO ASOCIO
(Filio de I.K.U.E. = Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista)
BULLETIN TRIMESTRIEL DE L'ASSOCIATION CATHOLIQUE FRANCAISE
POUR L'ESPERANTO

*** *Sankta* PIO X-*a, preĝu por ni* ***

Imp. MOSER - 68127 NIEDERHERGHEIM



L O U R D E S

**ESPERANTO : INTERNACIA LINGVO**

Expéditeur/: Ass. Cath. Française pour l'espéranto
*Sendinto* 9, rue Paul Doumer
F- 68920 WINTZENHEIM-COLMAR

**Motif de non distribution**

- ☐ Adresse insuffisante
- ☐ N'habite pas à l'adresse
- ☐ Refusé
- ☐ Autres

Périodique Semi-routé

**PORT PAYE**

COLMAR (68)

## Surkovrile

Estas la Esperantista Kulturdomo -Kastelo GRESILLON - en Baugé (49) .
Ĝi aperis en la Monumentoj pri esperanto en 1952 .
Nuntempe ĝi nepre bezonas helpon por normigado de la sekureco por daŭre funkcii.

L'esperanto. Face aux problèmes linguistiques, une langue neutre vraiment internationale pour les contacts directs d'homme à homme.

Ĉiujn artikolojn oni rajtas reprodukti kondiĉe ke estu citata la fonto.Specimenon kun represo aŭ tradukado oni sendu al la redaktoro.

La materialon por la bulteno oni sendu al la redakcio nepre antaŭ la 20.a de marto.
Venonta bulteno aperos fine de marto 1999.

Finpresado la 24/12/1998

*FRANCA KATOLIKA ESPERANTISTO*

**Nro 199 Decembro 1998**

Trimonata eldonaĵo de Franca Katolika Esperanto Asocio (Association Catholique Française d'Esperanto A.C.F.E )
CCP : 2 324 93 N Rouen

Prezidanto:
S-ro A. BESSIERE
28,Rue C.St-Saëns
76000 ROUEN
Sekretario:
F-ino A.M CHANEY
56,Rue Corvisart
75013 PARIS
Kasisto :
S-ro G.VILLENEUVE
14,Rue Clair de Lune
91530 SAINT-CHERON
Religia Konsilanto :
P-ro L.BOURDON
7,Av. Salomon
59800 LILLE
Peranto IKUE:
S-ro M.COLLEU
95,Rue Victor Hugo
80440 BOVES
Redakcio :
Fam.BASSO-RESCIO
9,Rue Paul Doumer
68920 WINTZENHEIM
Fakse 0389794333
Rete 100623,3022@Compuserve.com

# Le Mot du Président

L'année 1998 a vu se tenir sur le sol français le congrès international oecuménique de Nantes et le congrès universel de Montpellier . L'année 1999 sera celle de notre pélerinage à Lourdes, à la fin du mois d'avril.

Nous serons sans doute nombreux à nous rendre dans la cité mariale pour nous mettre à l'écoute du message de Massabielle et trouver,avec l'aide de la Vierge Marie, les forces spirituelles nécessaires à l'accomplissement de notre tâche d'apostolat dans les milieux espérantistes.

Mais nous n'oublierons pas non plus de méditer la vie très chrétienne de Ste Bernadette Soubirous. Celle ci est toujours d'actualité, car Bernadette a connu des situations qui sont celles de beaucoup de nos comtemporains. La famille Soubirous, marginalisée à la suite de la crise économique qui l'a frappée, a connu le chomage, la misère et l'indifférence de son entourage. Bernadette a dû interrompre très tôt ses études pour travailler et aider les siens. Mais dans cette situation proche de la plus extrême pauvreté, les Soubirous ont toujours gardé leur dignité et n'ont jamais desespéré de l'amour divin. Ils ont su faire face, avec l'aide de la prière, et le secours de leur foi, à leur infortune.

Bernadette,choisie pour recevoir en son âme toute empreinte de charité, les révélations de Marie ,conservera sa simplicité et ne tirera jamais profit du privilège reçu.

Prenons la comme exemple et sachons lui ressembler.

Bonne et heureuse année 1999 à vous tous.

# La Bileto de la prezidanto

En la jaro 1998 okazis en Francio la internacia ekumena kongreso en Nantes kaj la universala kongreso en Montpellier. La jaro 1999 estas tiu de nia pilgrimo en Lourdes, je la fino de la montato aprilo.

Ni sendube estos multnombraj, kiuj iros en la Maria-urbo por aŭskulti la mesaĝon de Massabielle kaj trovi,kun la helpo de la Virgulino Maria, la spiritajn fortojn necesajn al la plenumado de nia apostola laboro en la esperantistaj medioj.

Sed ni ne forgesos plie mediti la tre kristanan vivon de Sta Bernadette Soubirous. Tiu ĉi estas ĉiam aktuala, ĉar Bernadette konis situaciojn, kiuj estas tiuj de multaj el niaj samtempuloj. La familioSoubirous , marĝenita pro la ekonomia krizo, kiu atingis ĝin, konis senlaborecon, mizeron kaj indiferentecon de la ĉirkaŭularo. Bernadette devis rapide ĉesi siajn studojn por labori kaj helpi siajn samfamilianojn. Sed en tiu situacio, proksima al la plej granda mizero, la Soubirous-anoj ĉiam konservis sian dignecon kaj neniam malesperis en la Dia amo; ili sciis fronti, dank'al la preĝo kaj sia fido, sian malbonsorton.

Bernadette, elektita por ricevi en sia animo, tutplena je karitato, la revelaciojn de Maria, konservos sian simplecon kaj neniam tiros profiton el la ricevita privilegio.

Ni prenu ŝin, kiel ekzemplon kaj ni sciu simili ŝin.

Bonan kaj feliĉan Novjaro 1999 al vi ĉiuj.




# KRISTNASKO

Kia estas tiu peranto, vi diros, kiu naskiĝas en ŝafejo, kiun oni kuŝigas en trogo, kiun oni vindas, kiel kian ajn suĉinfanon, kiu ankaŭ ploras, kiel ili, kiu unuvorte estas kuŝita, kiel ĉiuj novnaskitoj ?

Tamen tiu peranto estas granda en tuto; Li traserĉas ĉion celante la pacon, ne ŝajne sed efike.

Vere jen suĉinfano nekapabla paroli; Li tamen estas la Dia parolo kaj Lia senparola infaneco certe ne restas muta.

Sta Bernardo (A.B)



LETERO el TAIZE:

# Letero el Taizé 1999-2001[1]

Ĉu ekzistas realoj vivbeligantaj kaj alportantaj ekfloriĝon kaj internan ĝojon ?... Jes, certe . Kaj iu el ili nomiĝas konfido. Ĉu ni komprenas, ke en ĉiu el ni, la plejbono konstruiĝas dank'al tutsimpla konfido? Eĉ knabo tion trafas.[2]

Sed, ĉiuaĝe, estas doloroj, homaj forpasoj, morto de tutproksimulo. Kaj, nuntempe, por multaj tiom malcertas la estonto, kaj ili malkuraĝiĝas. Tiam, kiel eliri la maltrankvilon?

La konfidfonto staras en Dio, kiu estas amo[3]. Lia amo estas pardono kaj interna laùdo.

La konfido ne ignoras la suferon de tiom da malproksimuloj tramondaj, kiuj havas nek laboron nek nutraĵeblecon.[4]

Tiuj malfacilaĵoj kialigas nin : kiel sidi meze de tiuj,kiuj,apogataj de komunivivo kun Dio, transprenas respondecojn kaj provas kun aliuloj loĝebligi la teron ?[5]

Dank'al la profundkonfido ni ne nur ne rifuzas la respondecojn sed ni ankaù staras tie, kie la homsocietoj malfirmas aù disfalas. Ĝi ebligas la riskoprenon kaj la antaùeniron eĉ se malsukceso subite okazas. Kaj vekiĝas la bela miro: tia konfido kapabligas amon nek profiteman nek ekkapteman.

Hodiaù, tertrae, tiom da gejunuloj provas sanigi ŝirojn en la homa familio. Ilia konfido povas ĉirkaù si beligi la vivon. Ĉu ili scias, ke senintence espero radias en ili ?[6]

La konfido kaj la espero ĉerpiĝas el mistera presenco, tiu de Kristo. Ekde Sia releviĝo Kristo vivas en ĉiu el ni per la Sankta Spirito;[7] eĉ pli Li estas "kunigita al ĉiu homo senescepte".[8]

Multaj homoj ne scias, ke Kristo estas kunigita al ili kaj ne scias, ke Lia rigardo direktiĝas al ĉiu vivo.[9] Tamen en ĉiu Li staras samkiel korhumilulo. Kaj pacema Lia voĉo aùdiĝas: "Ĉu vi rekonas la espervojon malfermitan por vi ? Kaj ĉu vi preparas vin tien eniri ? "[10]

Tiam kiel ne esti puŝata por diri al Kristo: "Mi volus Vin sekvi tutavive, sed ĉu Vi konas miajn malfortojn ? "[11]

Dank'al la Evangelio Li

1 *Kial de 1999 ĝis 2001? Ĉar en la momento,kiam ni eniras la trian miljaron neniu volus ekflamigi pajlajn fajrojn. Tiuj fajroj estingiĝas per si mem. En la jaro 2000a interesos nin la fakto, ke Kristo restados en la estonta vivo de la homa familio.*

2 *Se ni scius en kia grado iuj infanoj bezonas la konfidrigardon por retrovi la vivĝojon... Enkore de infano sperti, ke ĝi estas tenere amata, kaj plie pardonita, povas esti dumviva pacfonto.*

3 *1.a Johano 4,8. Komentante la parolon de sankta Johano el Ninivo,skribis: "Dio povas nur doni sian amon". Tio estas tiel vera: Dio neniam estigas homan timon, angoron, angoregon. Li deziras nek militon, nek akcidentkatastrofon, nek naturperforton. Dio senkulpas pri tio . Li estas la Senkulpeco.*

4 *Laù UNESCO la mondaj promilitaj elspezoj sumas ĉiujare je 800-900 miliardoj da dolaroj. Nu 130 miliardoj da dolaroj sufiĉus por doni domon,trinkeblan akvon kaj sanitarajn bazekipaĵojn al unu miliardo kaj 300 milionoj da personoj, kiuj vivas laù absoluta malriĉo.*

5 *En Taizé ĉiam ekzistas en la alvokiĝo de nia komunumo tiuj ambaù aspiroj: vojiri laù interna vivo tra la persona preĝo kaj la belo de la komuna preĝo kaj preni sur si respondecojn, por ke la tero fariĝu pli loĝebla.*

6 *La malkovroj de la scienco, la novaj teknologioj povas orienti ĝin je la servo de la homaro, kiu pli multiĝis laù neniam ĝis nun trafitaj proporcioj. Tamen la estonto ripozas, pli ol estas sciate, sur interna vivo subtenata de kontemplado, sur elano al repaciĝo inter ĉiuj, sur vivo simpla kaj disdona.*

7 *Antaù ol forlasi siajn disĉiplojn Kristo promesis al ili, ke Li ne lasos ilin solaj: "Dio sendos al vi la Sanktan Spiriton,Li estos via konsolanto,Li estos ĉiam kun vi" (Johano 14,16) Samkiel Kristo surtera ĉeestis la siajn, tiel dank'al la Sankta Spirito Li daùre ĉeestas nin hodiaù. Kristo ne videblas sed temas pri la sama presenco. Niamorte la Sankta Spirito ne disiĝas de nia animo kaj en la eterna vivo Li akompanas nin por ĉiam.*

8 *"Gaudium et Spes = Ĝojo kaj espero" . Tiu intuicio povos klarigi la tutan futuron de tutmonda pastoralo (pastoralo: spirituala agado de la Eklezio kaj ties membroj- NdT).*

9 *Iufoje estante kun miaj fratoj en Bangladeŝo, kie ili partoprenas en la vivo de la plej malriĉaj, ni estis invititaj al renkontiĝo kun Muzulmanoj en iu antaùurbaĉo*

*(ladurbo) . Iu el tiuj Muzulmanoj,kiu noktokomenciĝe elakompanis min diris al mi :"Ĉiuj homoj havas la saman Majstron. Tiu sekreto ankoraù ne reveliĝis. Sed pli poste ĝi estos malkovrita"*

**10** *Kial en larĝaj regionoj de l'mondo tiom da gejunuloj distanciĝis de la Dikonfido ? Se ne estus tiel alsubo de l'kredo nia komunumo ne investus tiom da energioj por akcepti en Taizé, semajnon post semajno kaj tutjare, gejunulojn el la tuta mondo. Sen tiu nuna ŝanceliĝo de la spiritaj valoroj, ni ne estus pelataj al irado al la gejunuloj por nin kialigi kun ili. Pro tio ekde 1962-a nin devigis la egdiskreta irado al orientajn landojn por renkonti gejunulojn.*

**11** *Por sin konfidi al Kristo necesas, ke ni ege malfermu nian koron. Kiam la koro plenas je simpla deziro al komunio kun Kristo, ni konscias, ke ni jam apartenas al Li: "Se vi deziras Dion koni, vi jam havas la kredon " skribis sankta*

respondas : "Mi konas viajn afliktaĵojn kaj malriĉon ... Por tutavive fidelresti, vi opinias, ke vi havas nenion aù preskaù nenion. Tamen vi estas superŝutita. [12] Per kio superŝutita ? Per la estonteco de l'Sankta Spirito ...[13] Lia kompatemo lumigas ĝis la ombroj de via animo".

Se iu fideleco por sekvi Kriston supozas senĉesan atenton, ĝi returne donas tiom da ĝojo, tiom da paco, tiom da klaro.Kiu serĉas komunion kun Dio lasas sin prilabori per iu el la tutsimplaj vortoj de l'Evangelio : " Dio ne donis al ni timspiriton sed spiriton de interna forto, de amo kaj sinregado. [14] Kristo spertas pri nia streĉado por esti fidelaj. Senlace Li diras al ni :" Fordonu vin ! Donu al Mi viajn timojn ! "
Li tiras nin el nia soleco kaj ebligas al ni nin apogi sur tiu mistero de amkomunio,kiu nomiĝas Eklezio.
Ni bonvolus por ĉiam memori tion: Kristo antaù ĉio estas komunio. Li ne venis surteren krei novan religion sed por estigi amkomunion kun Dio.
Kaj ju pli simplece[16] la Eklezio akceptas,[15] des pli ĝi apudas niajn fragilajn korojn. Malmultparole, ankaù silente, ni estas puŝataj al Kristsekvado por



*Aùgustenon la 4a jarcento.*
**12** *Apokalipso 2,9*
**13** *En la 7-a jarcento sankta Maksimo la konfesanto skribis : "La Sankta Spirito foras el neniu ajn homo" . Estas tiuj, kiuj scias dank'al la Skribo, ke la Sankta Spirito enas ilin. Estas ankaù tiuj,kiuj tion ankoraù ne scias aù ne scios surtere, sed tion malkovros en la eterna vivo.*
**14** *2a Timoteo 1,7 Mastreco de ni mem kaj la korpaco povas tiom necesi, ne nur por ni mem sed ankaù por tiuj, kiuj ĉirkaùas nin.*
**15** *Inter la akceptgestoj estas tiu de la benita pano. iutage Kristo benis kvin panojn kaj disdonis ilin inter ĉiuj (vd Mt 14,13-21). De tio naskiĝis en iu tre malnova historio tiun geston: doni benitan panon al ĉiuj, kiuj ĉeestas la eùkaristian celebradon kaj inter ili al tiuj, kiuj ne rajtas ricevi la eùkaristion.*
**16** *Se la vivsimpleco sinonimus morrigidecon, kiel ĝi malkovrus la Evangelion ? La spirito de simplo tra signoj de serena ĝojo kaj ankaù tra la korgajeco. Simpligi invitas por disponi la malmulton, kiun ni posedas en la simpla belo de la kreaĵo. Ke neniu sin prizorgas, ĉar li havas malmulton por disdoni : tiel eta kredo, malmulta*

la aliaj.

Se eblus sondi iun homan koron, kion ni trovus ? Surprizus, se ni malkovrus, ke plejprofunde de la homa kondiĉo kuŝas kaj prezencatendo kaj silenta komunideziro.
Dum tia atendo certaj diras al si: "Mi volus malfermiĝi al Dio samkiel mi estas sed mia preĝo vagas kaj mia koro disiĝas "[17].
La Evangelio respondas: "Dio pli grandas ol via koro".[18]
Se ni havas la impreson, ke ni preĝas pere de preskaù nenio,[19] ĉu Dio ne estas por ĉiuj Patro, kiu tenere akceptas ?[20] La lasta preĝo de surtera Kristo memorigas tion al ni : "Patro,viamanen mi metas mian spiriton " [21].
La soleca preĝo kelkfoje malfacilas .[22] Dirata tra simplaj vortoj, himnoj kaj kantoj ĝi kapablas trafi la animfundon.[23]
Kiu marŝas post Kristo staras samtempe proksime de Dio kaj proksime de la aliaj.
Preĝo estas serena forto, kiu prilaboras la homkoron, ĝi movigas kaj ne permesas, ke ĝi ekdormu fronte al malbono, al skuoj, kiujn multegoj spertas. Enpreĝe cerpiĝas necesnepraj kompatenergioj. [24]

*posedaĵo ! En la disdono de tiu malmulto Dio ofertas korsurabundon, neelĉerpeble.*

17 *Demando reas: kial direkti al Dio eksplicitajn preĝojn, ĉar Li konas ĉion pri ni ? Kristo klarigas tiun misteron : Li mem preĝis per vortoj tiam, kiam Dio sciis pri la tuta intenco de Lia koro.*

18 *1a Johano 3,20*

19 *Inter la elorientaj kristanoj ekzistas tiuj,kiuj tutavive murmuras intelegeblavoĉe aŭ ne, laŭ la ritmo de sia spiro, la preĝon de la Nomo de Jesuo. Diri kaj rediri tiun unikan nomon, "Jesuo", plenigas komunion.*

20 *Iuj el la plej belaj dirmanieroj de la Dia tenero troviĝas en la parabolo de la malŝparema filo (vd Lukon 15,11-32).*

21 *Tiuj paroloj de Jesuo: "Patro,viamanen mi demetas mian spiriton" (Luko 23,46) estas pronuncitaj de iuj ĉiuvespere antaŭ ol ili ekdormas.*

22 *Se nia preĝo spertas pri kvazaŭvakuo, ni lasu Dion paroli en ni. Ni memorigu tiujn vortojn, kiujn skribis sankta Aŭgusteno en la 4a jarcento: "estas korvoĉo kaj korlingvo ... Tiu interna voĉo estas nia preĝo, kiam niaj lipoj fermiĝis kaj nia animo malfermiĝas antaŭ Dio. Ni silentas kaj parolas*

Por tiu,kiu korfirme penas por sin forlasi al Kristo kaj al Li sian tutan vivon doni, estas elekto por fari, decido por preni. Kia decido ? Tia,kia enokorigas senfinan dankemon al Dio. Tiu dankemo estas fundamenta sinteno. Ĝi estas paca ĝojo, kiun la Sankta Spirito ĉiam vekas en ni.[25] Ĝi estas laŭdspirito. Ĝi provas direkti esperorigardon al la aliaj kaj ties atendoj.

Dio volas nin feliĉaj ... Dependas de ni, ke ni antaŭflaru, ke la realaĵoj de Lia Evangelio beligu la vivon: konfido, laŭdspirito, korsuperabundo, ĝojo ĉiumomente renovigita...[26]

En la Nova Testamento,Petro,la Apostolo,certigas tion al ni: "Vi amas Kriston, kiun vi ne vidis, kaj ankoraŭ ĉi-momente, sen Lin vidi, vi kredas je Li, kaj vi ektremas pro nedirebla ĝojo, kiu jam transfiguras vin ". [27]

Kaj se subite alvenas hezitnebuloj, ni surprizas nin, kiam ni diras:" Ni amas Vin,Vi, Kristo, eble ne samkiel ni volus,sed ni amas Vin.Kaj niavive la plej klara konstruiĝas dank'al tuthumila konfido al Vi" .



*nia koro ne al homaj oreloj sed al Dio. Estu certa: Dio kapablas vin aŭdi.*

23 *En niaj loĝejoj eblas bele taŭgaranĝi ĉambrangulon, eĉ etegan , por la preĝado, kun ikono kaj lumigilo. Kaj kelkaj aŭskultas iun kasedon, se ili mem ne kapablas kanti.*

24 *Kial malsanulo, aĝulo ĉagrenus dirante: "Mi faras nenion por la aliuloj"? Ĉu ili forgesintus, ke ilian preĝon tuj trovos neesperitan plenumon ?*

25 *Spirito Sankta subtenas en ĉiu ajn ĝojon, pri kia ankaŭ Jesuo surtere spertis.*

26 *Por antaŭeniri en la Dikonfido kaj interne sin konstrui bonas preĝi silentkore per kelkaj vortoj kaj rediri ilin ĉiumomente .*

27 *1a Petro 1,8*

28 *Sankta Serafino el Sarovo*

29 *Filipinoj 4,7*

30 *Mateo 5,24*

31

32 *Nenio pli konstantas ol la memoro pri vundoj el la pasinteco. Tiu memoro sukcesas trapasi de generacio al generacio. La pardono kaj repaciĝo helpas ĉe la transpaso de la memoro.*

33 *Mateo 5,44*

34*Laŭ sankta Augusteno,*

35 *Filipianoj 4,4*

En la 4-a jarcento, sankta Ambrozio el Milano skribis: "Komencu en vi la paclaboron tiel, ke, kiam vi mem ekpacos, vi donu la pacon al la aliaj " [28] La korpaco estas samkiel novnaskiĝo en ĉies plej intimo.[29] Kiu serĉas tian pacon povas nur atenti la vorton de Kristo: "Unue iru kaj repaciĝu "[30] "Unue iru" Kaj ne "Prokrastu ! " [31]

Por doni Kriston ĉu ekzistas realo pli travidebla ol vivo, dum kiu tagpostage repaciĝo konkretiĝas ? [32] Repaciĝi tio estas ami, pardoni ... kaj esprimi tion travive. Tio estas vigli por resti kompatema kaj bonkorema. [33]

Amu kaj diru tion tra via vivo ! [34]

Sen amo,sen pardono ĉu estas estonto por iu ajn ? Sen repaciĝo kia estonto estas por la paco surtera ?

Sen ĝojo kaj simpleco, tiuj realoj de l'Evangelio intime ligitaj unu al la alia, kiel radii pardonspiriton ne nur inter kredantoj sed ankaŭ apud nekredantoj ?

Tial "forpuŝante ĉiun korpremon,en Kristo ĝoju senfine ! ... Jes en Li trovu la ĝojon! "[35] Tradukis Pastro Degrelle.

## PROTOKOLO DE LA KOMITATKUNVENO DE LA 21-A DE OKTOBRO 1998 EN PARIZO.

Ĉeestis: S-ro Bessière, P° Bourdon,F-to Marmou,F-inoj Chaney kaj Michel,S-roj Colleu,Lafargue kaj Villeneuve.

Petis senkulpigon: S-ino Lafargue,S-ro Basso,S-ro Despiney.

S-ro Villeneuve prezentis la financan staton de la asocio; ĝi estas bona.

La komitato decidis, ke la junuloj ĝis 25-jaroj pagos duonan kotizon. Ĝi estis informita de la malbona situacio de la kulturdomo Gresillon kaj sendos al ĝi helpmonon de 3000 F.

Post la ekumena kongreso en Nantes,F-ino Chaney sendisraporton al la ĵurnalo La Croix kaj al la revuo Le Pélerin, sed neniu el ili publikigis tiun raporton.

La komitato prizorgis la preparon de nia pilgrimo al Lourdes. Vi legos aparte la programon kaj la necesajn informojn por aliĝi.

La meslibreto estas preskaŭ finpreta kaj estos sendube adoptita en la venonta kunveno, dank'al la laboro de S-ro Colleu.

En 1999 kvar postenoj de komitatanoj vakos. La kandidatoj, kiuj deziras esti elektitaj aŭ reelektitaj sin anoncu ĉe la prezidanto antaŭ la 15-a de januaro 1999.

La bulteno ne tro akurate alvenis pro la presado de la tekstoj okaze de la ekumena kaj universala kongresoj. La prezidanto sendos gratulleteron al la itala misio en Mulhouse , kiu favoras nian agadon kaj helpas en la eldono de la bulteno.

S-ro Pons raportis pri la eta biblio "Dio parolas al siaj infnoj". La afero kontentige progresas sed estus bone, ke ni ĉiuj reklamu pri tiu eldonaĵo.

La venonta komitatkunveno okazos en Parizo la merkredon la 20-an de januaro 1999.



# PILGRIMO AL LOURDES

La pilgrimo okazos de la 30-a de aprilo 1999 postagmeze ĝis la 4-a de majo 1999 matene en la dustela Hotel des Sanctuaires 5 Place de la Merlasse , 65100 LOURDES . Tel: 05 62 94 80 80

Aliĝkotizoj :

-ĝis la fino de februaro :
unuopulo 60 F, geedza paro 90 F

-ekde la 1-a de marto
unuopulo 80 F, geedza paro 120 F

-Senpaga aliĝo por junuloj ĝis 25 jara, pastro, religiul(in)o, alilandano, blindulo.

Limdato por aliĝi : **20-an de marto 1999.**

La tuta restado en dulita ĉambro kostas 1145 F, ĝi entenas la tranoktadon, la manĝojn kaj la ekskurson al Pau.

La restado en unulita ĉambro kostas 1470 F. Atentu: la nombro de unulitaj ĉambroj estas tre mimigita . La ĉambroj estos atribuitaj al la plej fruaj aliĝintoj.

La aliĝkotizo kaj la restado estas pagendaj al :
*Association Catholique Française pour l'Espéranto, p.ĉ.k (ccp) al ROUEN 2324 93 N .*

La aliĝilon , oni sendos al S-ro Villeneuve,
14 Rue du Clair de Lune , 91530 ST-CHERON.

## PILGRIMA PROGRAMO :

vendredon,l a 30-an de aprilo 1999:

16.00 Akcepto de la kongresanoj
18.00 Diservo
20.30 Interkona vespero. Ekzerco de la kantoj.

sabaton, la 1-an de majo 1999:

9.00 Prelego de P° Girault pri ekumenismo kaj unuiĝo de la kristanoj,kun paŭzo kaj diskutado
14.30 Preĝpromenado sur la krucvojo.
18.00 Diservo
20.30 Prelego de P° Bourdon pri Rozario k.Eŭkaristio.

dimanĉon, la 2-an de majo 1999
9.30 Ĝenerala kunveno
11.15 Komitatkunveno
16.00 Vizito al la groto kaj partopreno en la procesio de la malsanuloj.
18.00 Diservo
20.45 Lumprocesio.
lundon, la 3-an de majo 1999:
8.00 Meso ĉe la groto
10.30 Vizito al la tombo de PO E.Peltier: butikumado
14.00 Ekskurso al Pau
20.30 Adiaŭa vespero.
mardon, la 4-an de majo 1999:
ekde la 9-a foriro de la partoprenantoj.

Atentu bone : Tiu programo estas provizora kaj povos esti ŝanĝita laŭ-necese.

## PILGRIMA ALIĜILO

Tondu aŭ fotokopiu kaj sendu al S-ro Villeneuve
14,Rue Clair de Lune 91 530 ST CHERON .
nepre antaŭ la 20-an de marto 1999 .

Nomo kaj Voknomo: ..............................................
adreso :.............................................................................
naskiĝdato (nur por junuloj) ...................
Mi aliĝas al la pilgrimo al Lourdes kaj pagas al Association Catholique Française pour l'Espéranto (pĉk ROUEN 2324 93 N la sekvantajn sumojn :
a) aliĝkotizo ......................Frankoj
b) restado en dulita ĉambro 1145 x ...=..........FF
mi deziras dividi la ĉambron kun ............................
c) restado en unulita ĉambro 1470 .............F
Sume : ............FF
Mi alvenas en Lourdes per aŭto aŭ ....... la ....an de aprilo je la .... horo kaj foriros la .... an de majo je la ....... horo
Dato kaj subskribo : ............

## GRESILLON BEZONAS VIAN HELPON

Nia kulturdomo, tiel grava kaj necesa por nia estonteco, bezonas monon por plenumi la postulojn de la komisiono pri sekureco kaj pagi konsekvence la necesajn aranĝojn por denove rajti akcepti gastojn.
Ni do instigas ĉiujn esperantistojn helpi laŭ sia ebleco, preparante ĉekon al Maison culturelle espérantiste p.ĉ.k NANTES 1485 39 P , skribante dorsflanke Fonduso Sekureco kaj sendante ĝin al :
S-ino J. Vincent , 28 Bis Rue de Milngavie
49150 BAUGE

## BONAN KAJ FELIĈAN NOVAN JARON 1999

## Kotiztabelo 1999

I.K.U.E kun "Espero Katolika" 140 F
Peranto : S-ro M. COLLEU
95,Rue Victor Hugo 80440 BOVES
P.ĉ.k 10 621 81 P LILLE .
A.C.F.E kun "Franca Katolika Esperantisto" unuopulo : 60 F
geedza paro : 80 F
infano ĝis 25-jara,pastro,religiu(in)o : 30 F
bonfaranto :200 F
Pagu al: Ass.Cathol.Franc.Esperanto CCP ROUEN 2.324.93.N

Dépot légal : 4eme trimestre 1998 C.P.P.A.P : N° 62532
Imprimé par : A.C.F.E à 9,Rue Paul Doumer 68920 WINTZENHEIM
Enregistrée le : 14 Juin 1996 à la Préfecture de Police de Paris
sous le n° 026831 ; Journal Officiel du 03/07/1996
Directeur : Albert BESSIERE Directeur délégué: Michel BASSO